

## 1921-10-17-sergeant-fousek\_1

Tre kare Samideano,

Mi ĝojis ricevi vian leteron de la 28-a de la ??? & ankaŭ viaj P.K. (unu el Praha, tre bela de Representa Domo) & pri ili mi multege dankas vin.

Tiu P.K. el Praha revigis min & memorigis al mi pli forte la belajn momentojn kiujn mi pasigis en Rep.Domo. Momentoj kiam ni ĉiuj vivis de sama idealo, havante ĉiuj la saman celon, momentoj kiam oni forgesis la ordinaran ĉiutagan vivon. Ho! Belaj tagoj kiam revenos – vi?

Ĉu vi al kutimiĝas al via (kiel vi diras) „novpatreca ĥaoso“? Sendube jes – ĉar oni al kutimiĝas al ĉio en la vivo. Ni diras ĉe ni: „L'habitude est une seconde vie“. Vi eĉ sendube al kutimiĝas al la manko de dormo pro via infanineto. Eble ŝi estas pli saĝa. Mi esperas ke ŝi daŭras ŝian bonan sanon & la patrino same.

Mi timas ke la ĉapeto kiun mi faris estos multe tro malgranda dum la printempo sekvanta.

Mi faris ĝin por la somero post la 5-a de Aug.

Vi ne povas imagi la belegan, sunan veteron kiun ni ĝuis kelkaj semajnoj – varmece tute kontraŭregula por oktobro. Nur de post 3 tagoj

## 1921-10-17-sergeant-fousek\_2

la matenoj frue & vesperoj estas freŝaj – nur 7° & je meztago estas 35° (centigradoj). Nature ni ne havas ankoraŭ fajrojn, nek ni pripensas al ili. Mi estas blanke vestigata kiel en Julio & ludas tenison ankoraŭ. Sed oni nenion plu vidas je 6 h 30 (& vere estas nur 5 h 30 ĉar oni ne ankoraŭ restarigis nian vintran horon – post la 25 t. m.)

Sabaton mia edzo & mi iris sur tre bela kamparo ne tre malproksime de tie kie estas pinarbaroj, lagetoj & sablfontetoj. Ni kuŝiĝis tie & pasigis la tutan dimanĉon. Vespere & matene sub la diketa nebulaĵo tiu kamparo estas belega. Ĉu vi ne ŝatas leviĝi frue sur la kamparo & vidi la sunleviĝon?

Ekzistas la malnova kastelo tie kie Henriko VIII de Anglujo loĝis – ĝi estas tre bela.

Dankon por via skribo al la Postoficejo en Praha.

Ĉu mi rakontis al vi ke advokato tie, entuziasmita de ĉi rakontoj de mia vojaĝo faris la saman & manĝis en la Reprezenta Domo & konatiĝis kun nia afabla kelnero kiu parolis al li pri ni?

Mi kunsendas fotografaĵon faritan antaŭ la monumento de D-ro Z. post la paroladoj.

Ni esperas ke vi ne ankoraŭ ĝin posedas.

Por rekoni la personojn laŭ la nomoj, tenu ĝin antaŭ forta lumo aŭ suno.

### 1921-10-17-sergeant-fousek\_3

Mi havas la saman en tre granda formo.

Ĝi ŝajnas plensukcesa, ĉu vi ne opinias tiele?

Mi multe bedaŭras kiam vi diras ke vi nune malmulte zorgas Esperanto! Ĉu estas eble? Vi kiu estis tiel fervora? Sendube estas nur momente & baldaŭ via fervoro denove vekigĝos.

Ĉu vi devos proesi kun la kuracisto loĝanta en via estonta hejmo ĉar li rifuzos forlasi ĝin? Vi ne diris kial?

S-ro Berger presis en sia B. E. S. mian nomon sen ia ajn peto mia pri tio. & nun jen oni skribas al mi. Eĉ de via lando. Mi ricevis tre interesajn leterojn de s-ro el Znojmo. Mi respondis & klarigis ke mi ne havas tempon korespondi kun li & mi serĉas alian por li – eble fraŭlinon – sed li ne volas & diris ke li atendos paciencem. Liaj leteroj estas pleninteresaj.

Hieraŭ en la pinarbaro ni renkontis tre faman homon. Pastro Boulie kiu estas serĉakviston. Li promenas kun peco da ligno en ambaŭ manoj tiele fariti & li marŝas. Kiam akvo estas subtera la lignaĵo sin returnas – poste li sur la loko levigas la piedon dextran tiom da foje kiom la akvo estas profunda de 0 met. 80.

#### **1921-10-17-sergeant-fousek\_4**

estas same por ia ajn fosaĵo aŭ kavaĵo. Oni petas de li en la tuta Francujo ke li bonvolu iri por serĉi akvafluejon. Hodiaŭ li iros al „Reims“ por akvon & ankaŭ por eltrovi fosaĵojn – tombejojn en la Katedralo. Li malkovris trezoron sammaniere la lastan monaton. Li estas granda scienculo & tute ne bigotulo kvankam li estas pastro. Mi ofte aŭdis pri tiu serĉantoj de akvejo sed neniam renkontis ilin. Li estas tute preciza pri la mezuro de la profundeco ankaŭ. Ni parolis kun li dum 1 horo & baldaŭ vizitos lin & li montros al ni eksperimentojn.

Mi ricevis leterojn de D-ro Lion Zamenhof kiu petis mian opinion pri artikoloj siaj en gazetoj (??) Mi kopiis multajn leterojn de lia frato D-ro Aleksandro & sendis ilin al li. Tio estis tre malĝoja okupado kiel vi povas imagi.

Mi ricevis leteron de mia korespondanto idealisto el Stockholm dirante ke nune ili ĉiuj varmiĝas antaŭ la porcelana hejtaparato & estas vintro ĉe ili.

Mi demandas nun ĉu ĉe vi estas same aŭ ĉu vi ĝuas nian someran veteron.

Salutu vian edzinon kareson al Eva & por vi miajn amikajn pensojn.

Alice Sergeant